# TEA-BULTENO

$4^a$ JARO — NOVEMBRO 2001 — NUMERO 9





## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| **1** | **Ĵ** | |
| 2 | V | **Sidejo fermita** |
| **3** | **S** | |
| **4** | **D** | |
| 5 | L | |
| 6 | M | Ni parolu Esperante! |
| 7 | M | |
| 8 | Ĵ | |
| 9 | V | Prezento de leginda libro |
| 10 | S | **Ĉiuj ĉe Anita!** |
| **11** | **D** | |
| 12 | L | |
| 13 | M | Ni parolu Esperante! |
| 14 | M | |
| 15 | Ĵ | |
| 16 | V | Kartludado |
| 17 | S | |
| **18** | **D** | |
| 19 | L | |
| 20 | M | Ni parolu Esperante! |
| 21 | M | |
| 22 | Ĵ | |
| 23 | V | **Planoj por la jaro $2002^a$** |
| 24 | S | **Malferma Tago ĉe UEA en Roterdamo** |
| **25** | **D** | |
| 26 | L | |
| 27 | M | Ni parolu Esperante! |
| 28 | M | |
| 29 | Ĵ | |
| 30 | V | **$4^A$ GASTRONOMIA KONKURSO: SUPOJ!** |







## Anoncoj!

Ni denove vigle aktivas, malgraŭ la ankoraŭ sentebla laceco prikongresa, jam havas en kapo novajn projektojn por disvastigado de nia lingvo kaj samtempe klopodas proponi interesajn, vesperajn programojn ĉefe al vi, karaj TEA-anoj! Se momenteton, dum paŭzo de viaj ĉiutagaj laboroj, vi ĵetas rigardeton al la agendo de ĉi bulteno, certe vi sukcesos trovi ion por vi allogan, altiran kaj partoprenindan. Bonvolu rememori, ke preparo de iu ajn programero postulas tempon kaj laboron de la koncerna prizorganto, kaj se neniu poste ĉeestas la aranĝon, tio sensencigas kaj neniigas la tutan faradon.

Nu, ni kune esploru la ĉi-monatan agendon:

- ☑ **Ĉiumarde** okazas lingvo-ekzercado per klarigo de gramatikaj problemoj, konversaciado, legado de interesaj tekstoj, traduko de itala al Esperanto kaj inverse… nome, simpla klopodo paroli kaj paroligi Esperante, por pliperfektigi proprajn konojn pri la lingvo mem kaj pri ties historio, kaj por plibonigi la esprimmanieron ĉu buŝan ĉu skriban. Vi estas ĝentile invitata interveni, kiam ajn!
- ☑ **La $9^{an}$** - prezento de leginda libro. Kunlegado, komentoj kaj opinioj pri ĵus aperinta libro: MONDOJ - 34 Esperantaj rakontoj de diversaj aŭtoroj, inter kiuj S. Johansson, T. Steele, S. Ŝtimec.
- ☑ **La $10^{an}$ , ekde la $17^a$ horo** - Sur monteto, de kie ĝueblas mirinda panoramo al la tuta urbo, staras la hejmo de Anita, belvidejo mergita en pura naturo. Suficas, ĉu ne? tutcerte vi ĉiuj estis iam gastoj de nia samklubanino kaj bone konas la tiudirektan vojon. Nu, vi ĉiuj estas varmkore bonvenigitaj de ŝi por pasigi posttagmezon, vesperon kaj … eĉ nokton (se Anita tion toleros!) en amika etoso, Esperante kaj "Krokodile" parolante, manĝante bongustaĵojn preparitajn de bonvolemuloj kaj trinkante varman kaj varmigan teon, ktp. Sinanoncoj ĉe TEA-sekretario.
- ☑ **La $16^{an}$** - Kartludado. Bonvenas de tempo al tempo la momento ankaŭ por kune ludi en malstreĉa etoso. La asocia salono transformiĝos en kartludejon: ĉe diversaj tabloj ĉiu povos elekti sian plej ŝatatan ludon.
- ☑ **La $23^{an}$** - Jen tute serioza programero: jam nun ni devas pripensi la venontjaran aktivecon de TEA. Estos do, prezentitaj la priaj planoj. Certe vi ĉiuj konscias, ke nia prioritata tasko estas informadi pri Esperanto, plej bele kaj trafe ĝin prezenti al la publiko kaj, kompreneble, ĝin instruadi. Nu, ni povas strebi al realigado de la tiucelaj projektoj, nur se vi ĉiuj subtenos nin kaj kunlaboros kun ni. Do, ni atendas vin multnombraj!

**Vendredon la 30an de novembro - 20a h.**

## 4a Gastronomia Konkurso



Jen por vi alia ĉimonata programero, unu el la plej ŝatataj kaj aprecataj, dum kiu kutime abundas kaj ĉefroluloj, nome kuir-artistoj, kaj spektantoj, aŭ pli bone manĝantoj. Jam 4-foja evento! Ĉiu havos la eblon sursceniĝi kaj prezenti sian artaĵon: nura kondiĉo - respekti ties temon!

## Supoj



Por partopreni en ĝi kiel konkursantoj, sufiĉas sin anonci, ĝis la 20a de novembro al sekretario. Memkompreneble, la spektontoj=manĝontoj estas petataj antaŭmendi ĉetablan sidlokon, alie oni riskas ne plu trovi iun liberan.

### Regularo de la Konkurso

PIV klarigas: ★sup/o. Likva manĝaĵo, konsistanta el akvo, en kiu estis kuiritaj diversaj ingredientoj: *legoma (magra), vianda, supo; supo kun reveme naĝantaj buletoj*[Z]*; avena, cepa, okzala, piza, porea, el bova vosto, el tomat-pureo... supoj.*

Do, la kuiristo mem decidos kion proponi al la juĝantaro, kiu - atentu! - estas tre severa kaj pretendema, precipe ĉar valoraj premioj estos disdonendaj al la premiotoj! La juĝanta manĝantaro per slipoj atribuos la poentojn al la plej ŝatata supo. Ĉiu plado povas ricevi de 0 ĝis 10 poentoj. Sekretaj estos kaj voĉdonado kaj la nomo de kuiristoj: malsekretaj nur la supaj nomoj. Voĉdonas kuiristaro kaj juĝantaro. Por partopreni en ĉi-vespero, oni devas pagi nur la luon de la **nepre asociaj** kulero kaj telero. Pri ties kostoj kaj por antaŭmendoj, ĉe la kasisto.



## Tonkin kun akordo en la Malferma Tago

La vicprezidanto de UEA prof. Humphrey Tonkin prelegos kaj la nederlanda Esperanto-ensemblo AKORDO kantos dum la 15a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton la 24an de novembro. Krom paroli pri aktualaj defioj de UEA, prof. Tonkin prezentos ankaŭ la libron MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO de Tivadar Soros, fondinto de LITERATURA MONDO. La profesoro redaktis kaj provizis per abundaj komentarioj la duan eldonon de tiu verko pri la vivo de juda familio dum holokaŭsto en Budapeŝto.

La novembra Malferma Tago estos speciala, ĉar tri laborantoj de la CO, kiuj en 1994 iniciatis tiun popularan tradicion kaj ĝis nun motoris ĝin, por la lasta fojo rolos en ĝi kiel oficistoj. La libroservisto Simo Milojeviĉ emeritiĝos en decembro, kaj post la jarfino forlasos siajn postenojn Osmo Buller, la ĝenerala direktoro, kaj Pasquale Zapelli, la direktoro de la CO.

Kiel ĉiam, la libroservo rabatos ĉiujn prezojn je 10% kaj kelkajn eĉ pli. Funkcios bazaro de esperantaĵoj, oni montros Esperanto-filmojn kaj ĉiu vizitanto partoprenos en senpaga loterio. Senpagaj kafo kaj teo estos varmaj dum la tuta tago, t.e. ekde la 10a ĝis la 17a horo.

Nu, profitu de ĉi-okazo por viziti la sidejon de nia pint-instanco, esplori la riĉan librovendejon, ĝui la kleran paroladon de elstaruloj kaj tutesperantan etoson!

## Seminario "Esperanto kaj Plurmedioj"

Organize de Massa Esperanta Grupo D-RO MARIO DAZZINI, ĝi okazos en *Massa* de la 2a ĝis la 4a de novembro. Jen la detala programo, tre interesa kaj tute aktuala:

**Vendredo 02/11/01**

10.00 Prezentado de la Esperanta Movado (itallingve) – *d-ro U. Broccatelli – d-ro Alessandro Dematheis*
15.00 Oficiala malfermo – *S-ino Ionne De Angeli Bertozzi, grupa prezidantino*
15.30 Didaktika metodologio por lernado de lingvoj – *Diversaj referantoj*
16.00 La problemo de supersignoj en interreto kaj ĝiaj diversaj solvoj – Ĉapelilo: prezentado de problemsolvo por videoskribado en esperanto – *D-ro Alessandro Simonini*
17.15 Kafo-paŭzo
17.30 Prezento de KD de Alessandro Dematheis (Esperanta Kurso) – *D-ro A. Dematheis*
18.30 Prezento de nova Kurso KEK – *Prof-ino Laura Brazzabeni*
19.00 Prezentado de aliaj kursoj disponeblaj en reto – Vortaroj kaj vortaretoj – *Diversaj referantoj*
21.00 Muzika vespero – *Massa Esperanta Bando*

**Sabato 03/11/01**

09.00 Vizito al la Marmor-Muzeo kaj al la Skulptejo NICOLI - *Carrara*
14.30 Atentigoj pri komputil-uzado – *Manuel Giorgini*
15.30 Babilejo – *Kunordigo pere de masanoj esperantistoj*
17.30 Multlingva bildvortaro konstruita pere de esperanto – *D-ro Umberto Broccatelli*
17.45 Kafo-paŭzo
18.00 Esperantaj ejoj en la reto
21.00 Apuanaj Alpoj: Universala lingvaĵo de ŝtonoj – *Prof. Elia Pegollo*

**Dimanĉo 04/11/01**

08.30 Sankta Meso ĉe Preĝejo de *Villa S. Maria*
09.30 "Civila societo por Federacia Eŭropa Konstitucio. Eŭropa identeco kaj lingvo-demokratio." Kunveno organizita kunlabore kun la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado kun partopreno de politikaj personoj. Debatgvidanto: *prof. Giordano Formizzi*
13.00 Fermo de la Seminario




Sabaton, ekde la 15a ĝis la 21a horo, funkcios poŝtoficejo, kie oni ricevos porokazan stampon. La stampo surhavas la jenan tekston: "54100 Massa Centro - 1° Seminario esperanto e multimedialità - Dott. Mario Dazzini" *(54100 Massa Centro -1a Seminario Esperanto kaj Plurmedioj).*

La Seminario okazos ĉe la Mezgrada Lernejo DON MILANI en *Marina di Massa.*

Informojn pri loĝado, aliĝkotizo petu al TEA-sekretario aŭ rekte al MASSA ESPERANTA GRUPO – C.P. 22 – 54100 Massa, aŭ telefonante al ties Prezidantino Ionne De Angeli Bertozzi: 0585 792066

Retpoŝto: simonini@bicnet.it

## Al ĉiuj grupoj

Pistoja E-grupo intencas organizi memorigan tagon por la ĉies granda amiko D-ro Umberto Stoppoloni. Oni intencas organizi tion dum la Zamenhofa tago, sed pro la fakto, ke kutime ĉiuj grupoj organizas ion dum ĉi tiu datreveno kaj dezirante, ke plej multaj da gesamideanoj kaj geamikoj de Stoppoloni venu al Pistojo por partopreni en tiu solenaĵo, jam nun oni disvastigas la jenan anoncon. La grupo varme esperas, ke ĉiuj decidu organizi vojaĝon al Pistojo dum la venonta $15^{a}$ de decembro por jubilei la Zamenhofan tagon, ĉiuj kune kaj kun Stoppoloni.

### Provizora Programo

09.00 - Meso en Esperanto en la Preĝejo $S^{ta}$ Franzisko de Pistojo.
10.00 - Vizito al la historia urbocentro.
12.00 - Vizito al la komunuma muzeo de Pistojo.
13.00 - Tagmanĝo.

Por detaloj kaj informoj, bv. kontakti la prezidanton:

Nicola Morandi
Pistoja Esperanto-Grupo UMBERTO STOPPOLONI
V.le Adua, 44 - 51100 PT
Tel. 0573/90.40.14 - 29.120 - 32.284
Port. 347/78.92.672 Fakso 02/700.507.446
nmorandi@mail.promonet.it
http://www.esperanto-grupo.it/nicola

## GUIDA DI SALÒ IN ESPERANTO

E' stata pubblicata la guida ai sentieri di Salò, distribuita gratis a tutte le famiglie, con traduzione in inglese, francese, tedesco ed **esperanto** e relativo spazio pubblicitario del gruppo esperantista bresciano.
Potete chiederne una copia a

Piccola Società Cooperativa LA RINASCITA 2001
Salita Marconi 29 - 25087 Salò BS
www.euroinformatutto.net

## Libro pri Grabowski

Eldonejo HEJME (Pollando) eldonis novan libron de Zofia Banet-Fornalowa, konata Esperanto-historiisto, kun la titolo «Antoni Grabowski - eminenta Esperanto-aganto». Antoni Grabowski apartenas al la unuaj talentuloj, kiuj fundamentis Esperanto-kulturon kaj estas konata kiel **Patro de Esperanta poezio**.
La libron oni povas mendi kontraŭ 12 eŭroj ĉe la eldonisto: Kazimierz Leja - Pk. 59, PL 41-250 Czeladz, Polio

Rete: kleja@post.pl

## Universala Kongreso en Afriko

Ekde Kristnasko 2001 ĝis la unuaj tagoj de la jaro 2002 en Afriko (Ganao, Togolando, Benino, Niĝerio, ktp) okazos sinsekve granda vico de naciaj Esperanto-aranĝoj, kiuj, kune, laŭ asertoj de organizantoj, estos ne malpli grandskalaj ol la fama UK.

Tiuj ĉi nekutimaj aranĝoj ne enhavos kutimajn program-erojn de UK kiel ekzemple prelegojn, sed garantiataj estas afrikaj mirakloj, paroladoj en Esperanto, laborgrupoj kaj bona etoso kun amaso da afrikaj dancoj kaj piedpilkaj ludoj.

Ĉiuj eksterafrikaj esperantistoj estas kore bonvenaj viziti Afrikon kaj partopreni tiun kongresumadan vicon. Pli detalajn informojn oni povas ricevi ĉe:

Agnes Geelen - Rete: agnes@esperanto.be



## Radio Havano Kubo

anoncas, ke ties elsendo estas nun kaptebla ankaŭ pere de interreto, kie eblos aŭdi la kuban voĉon pere de *Real Audio*, ĉiudimanĉe je la $15^{a}$ UTC. Estos bonvenaj viaj laŭdoj aŭ kritikoj pri la kvalito de la aŭdeblo kaj pri la programo mem. Esperanto-Redakcio de Radio Havano atendas viajn reagojn: retpoŝto radiohc@ip.etecsa.cu kaj invitas vin viziti la TTT-ejon: www.radiohc.cu

## Konkurso de Ĉina Radio

La $3^{an}$ de decembro de la kuranta jaro ĈINA RADIO INTERNACIA celebras la $60^{an}$ datervenon de sia fondiĝo. Ĉi-okaze, la radio lanĉas konkurson pri koncernaj scioj, precipe rilatantaj al siaj pasinto kaj nuno, inter la $14^{a}$ de majo kaj la $30^{a}$ de septembro.

La respondindaj demandoj estas:

1. Kiam fondiĝis Ĉina Radio Internacia (antaŭe Radio Pekino)?
2. Kiam komenciĝis la Esperanta Disaŭdigo de ĈRI?
3. En kiom da lingvoj ĈRI elsendas programerojn?
4. Kiu estas la ret-adreso de ĈRI?
5. En kiom da landoj kaj regionoj troviĝas aŭskultantoj de ĈRI?
6. Kiuj du el niaj aŭskultantoj venis al Ĉinio kiel specialaj premiitoj?

Oni facile donos respondojn, se oni aŭskultos koncernajn raportojn, elsendotajn en la programero LETERKESTO. La redakcio volonte akceptas artikolojn aŭ rakontojn, disaŭdigotajn samprogramere.

ESPERANTO-SEKCIO de ĈINA RADIO INTERNACIA
16A Shijingshan Str. CN-100040 Beijing, Ĉinio
Rete: espradio@cri.com.cn

ĈINA RADIO INTERNACIA, ESPERANTO-SEKCIO, krome anoncas al ĉiuj italaj esperantistoj, ke ekde nun eblas skribi al ĝi, sendante la leterojn al

ESPERANTO-SEKCIO ĈRI-36
Via Teodoro Valfre, 12, int. 7 - 00165 Roma

De tie la leteroj estos aŭtomate transportataj al Ĉinujo fare de la raportista sekcio de Ĉina Radio Internacia en Italujo, alivorte oni rajtas skribi per enlanda poŝtmarko.

## Okazis tra la mondo

**Okazis** de la $7^{a}$ ĝis la $9^{a}$ de septembro la $52^{a}$ kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio en Velingrad, Bulgario. Dum ĝi estis pritraktita la kresko de la Esperanto-movado en Bulgario.

**Okazis** kunveno de radioamatoroj la $15^{an}$ kaj $16^{an}$ de septembro en *Vendee*, Francio. Dum ĝi estis elsendoj kaj perradiaj interkomunikoj kaj fakaj prelegoj.

**Okazis** ekspozicio de fotoj de japana esperantisto *Okada Sizuki* kun la titolo «Albanio tra la okuloj de japanino» en turisma mezlernejo de Tirana, ĉefurbo de Albanio. En la ekspozicio estis menciita multfoje ankaŭ Esperanto.

**Okazis** vizito de nova Esperanto-objekto «Esperanto Court» (sakstrateto) en Viktorio, Aŭstralio. Dum la vizito estis disdonitaj informiloj pri la internacia lingvo.

**Okazis** en oktobro enketado pri Esperanto inter la studentoj de la universitato en Montevideo, Urugvajo.

Kaj kio **okazis** ĉe vi?



## Italaj infanoj rikoltis premiojn en finna fabelkonkurso



Päätalo-Instituto, edukejo por verkemuloj en la nordfinnlanda municipo Taivalkoski, ĉiujare organizas fabelkonkurson por finnaj infanoj. Pasintjare ĝi havis eksperimente ankaŭ branĉon por fabeloj en Esperanto. La spertoj estis tiom kuraĝigaj, ke la Esperanto-branĉo estis parto de la konkurso ankaŭ ĉi-jare. UEA aŭspiciis ĝin kaj donacis premiojn por la plej bonaj konkursantoj.

En tri kategorioj konkursis 20 fabeloj el 9 landoj (Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Rumanio kaj Serbio). La ĵurio konsistis el Jouko Lindstedt kaj Raita Pyhälä el Finnlando kaj Anna Löwenstein el Italio.

En la kategorio de ĝis 9-jaraj geknaboj la unuan premion gajnis la grupo PINOKJO de la elementa lernejo *La Castellina* en *Prato*, Italio, pro la fabeloj «La sorĉistino kaj la araneoj» kaj «La sorĉistino kaj la forgesiganta pocio». La duan premion ricevis GRUPO DU el la infanlernejo en *Chateauroux*, Francio, pro la fabelo «Promenado en ĉina ĝardeno», kaj la trian premion la grupo MARKO el *La Castellina*.

Ankaŭ en la kategorio de 10-11-jaruloj la unua premio iris al klaso de la itala lernejo *La Castellina* pro la fabelo «La perdita harmonio». Per la dua premio estis distingita la fabelo «Iam estis monstro» de Karina MacGill el Hungario kaj per la tria «Pikec kaj Paŭlina» de Stefani Strunjak el Kroatio. Inter 12-14-jaruloj Zlatko Dordevic el Serbio konkeris ĉiujn premiojn per la fabeloj «Riĉa reĝo», «Princino de formikoj» kaj «Vojaĝoj kun marfeinoj».

Oni aljuĝis ankaŭ specialan premion **FABELO INTERNACIA**. Ĝin ricevis la grupo PINOKJO de la lernejo *La Castellina* pro la fabelo «La sorĉistino kaj la araneoj», kiu do premiiĝis duoble.

La diplomoj kaj premioj de la Esperanta konkurso estis disdonitaj kune kun tiuj de la finna, sveda kaj samea branĉoj en Iaivalkoski la 18$^{an}$ de oktobro. Tiu tago estas la nomtago de *Satu*, finna knabina nomo, kiu signifas "fabelo". (Vidu en ttt-ejo: www.taivalkoski.fi.)

## Konkurso pri desegnaĵoj

Okaze de la unua TAGO DE INFANOJ en la tria jarmilo kaj EŬROPA JARO DE LA LINGVOJ la Esperanto-rondeto ĉe Urba Kulturcentro en urbo Vyŝkov (CZ) preparas ekspozicion de infandesegnaĵoj kunlige kun konkurso, okazontan de la 23$^{a}$ ĝis la 31$^{a}$ de marto 2002.

Temo de la desegnaĵoj estas MIA HEJMO. Povas temi pri la familio, loĝloko, urbo aŭ vilaĝo, en kiu oni vivas, kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, regiono aŭ via lando.

Por la desegnaĵoj estos tri kategorioj laŭ aĝo de la aŭtoroj: ĝis 8 jaroj, 8-14 kaj 14-18 jaroj. Dorsflanke skribu nomon, naskiĝdaton, adreson kaj nomon de la desegnaĵo. Rekomendinda estas partopreno de infanoj el klasoj de virtuala lernejo TIBOR SEKELJ. Desegnaĵojn prijuĝos vizitantoj de la ekspozicio, aparte infanoj kaj plenkreskuloj kaj faka ĵurio. Ĉiu partoprenanto ricevos memordiplomon, la aŭtoroj de la plej bonaj tri verkoj en ĉiu kategorio premion. Formato de la desegnaĵoj ne estas limigita.

Konkursaĵojn sendu (pli grandajn formatojn prefere ruligitajn) tiel, ke ili venu ĝis la 15$^{a}$ de marto 2002 al la adreso: ESPERANTO RONDETO, MKS,
Jana Soupala 4 - CZ-682 01 Vyskov.
(Noto: Mallongigo MKS signifas Urba Kulturcentro.)
Kontakto perreta por eventualaj demandoj:
vojacek@jumbo.ped.muni.cz

---

**Kolektantoj de moneroj** petas helpon de esperantistoj el "eŭro-landoj". Inter 14-17 de decembro aperos en la 12 landoj t.n. "komencpakoj": oni deziras havi tiujn el ĉiuj landoj. Kontaktadreso: Randy A. Dean, 561 Emory Oaks Way, GA-30033 Decatur, Usono.

## Esperanto en la horaro denove!

Post unujara paŭzo la oficiala horaro de la hungara fervojfirmao MAV denove enhavas Esperant-lingvan klarigon pri la uzado de la horaro, pri la mallongigoj, ktp. Eĉ la Esperanto-versio estas pli ampleksa, ol antaŭ du jaroj. Notinde estas, ke tiuj klarigoj aperas en la horarlibroj nur de Ĉeĥio, Danio, Hungario, Jugoslavio kaj Rumanio. La denova aperigo de la internacia lingvo en la hungara horaro dankeblas al la petoj kaj proponoj de hungaraj kaj multaj eksterlandaj fervojistoj.

*Informis Istvan Gulyas*

## Euroscola en Esperanto

Post la sukceso de Euroscola 2001, jam necesas prepari Euroscola 2002. Ĉar klasoj povas partopreni nur unu fojon, jam urĝas trovi novajn klasojn, diligente instrui la Internacian Lingvon al la lernantoj, kaj havigi al ili esencajn konojn pri Eŭropa Unio kiujn ili povos pritrakti en Esperanto. Interesatoj povas aliĝi al la listo e-euroscola@egroups.fr. Informoj pri la programo INTERKULTURO, parte komplementa afero, estas riceveblaj de: Stefan MacGill - Rete: stefan.macgill@galamb.net

## Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso

La 5$^{a}$ Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso okazas
inter la 23$^{a}$ kaj la 28$^{a}$ de aŭgusto 2002 en Verona, Italio.
La ĉeftemo de la kongreso estas

Efektiva lingva egaleco: rajtoj de la eŭropanoj

La aranĝo estas la oficiala kunveno de Eŭropa Esperanto-Unio, sed kompreneble ne nur la reprezentantoj de la membroj-asocioj rajtas partopreni ĝin. Dum la kongreso okazos la komitatkunveno de EEU.
Oni povos ĝui diversajn, interesajn prelegojn pri la ĉeftemo kaj pri temoj, kiuj estas gravaj kaj interesaj por homoj, kiuj vivas en Eŭropo.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
Verona Esperanto-Grupo CP 1616, IT-37100 Verona,
Rete: esperantoverona@adriacom.it

---

Kontrolu viajn sciojn priesperantajn!
Ĉu vi scias la nomon de la unua gazeto redaktita en Esperanto? En kiu jaro kaj kie ĝi aperis?
Respondo aperos en la decembra Tea-Bulteno.

---

Parto de la informoj fontas el **RET-INFO** kaj **NOVA SENTO**.

**BULTENO** de la membroj de
Triesta Esperanto-Asocio
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349